

Lingvaj Rajtoj en la Mondo : la nuna situacio

Unuiĝintaj Nacioj, Ĝenevo, la 24-an de Aprilo 2008

Simpozio por celebri la Centjariĝon de la Universala Esperanto Asocio kaj la
Sesdekan datrevenon de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj

Raporto

Universala Esperanto Asocio

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando
telefono +31 10 436 1044 faksilo: +31 10 436 1751

ret-adreso : uea@co.uea.org retpaĝoj: <http://www.uea.org>
<http://www.linguistic-rights.org>

Organiza Komitato

Probal Dasgupta, Prezidanto, UEA

Ranieri Clerici, Vic-Prezidanto, UEA

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro, UEA

Charmian Common, Rerezentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo kaj

Vic-Prezidanto, Asocio Esperanto-Genève-Régions

Renato Corsetti, eksa-Prezidanto de UEA, Itala Esperanto-Federacio (IEF)

Stefano Keller, Sekretario, Svisa Esperanto-Societo kaj

Rerezentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo

Nicole Margot, Vic-Prezidanto de IKEL, Redaktoro, Etnismo, kaj

Rerezentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo

Cesco Reale, Sekretario, Neŭŝatela Junulara Esperanto-Societo kaj

Rerezentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo

Raporto preparita en la angla de Sinjorino Charmian Common, Rerezentanto de UEA ĉe UNO en Ĝenevo, oktobro 2008, kaj tradukita al Esperanto en 2009-novembro 2010. Koran dankon al Renato Corsetti pro kontrol-legado.

Enhavo

Tagordo	i
Malfermo de la kunveno, Sinjorino Renate Bloem, eksa-Prezidanto de la Konferenco de Ne-Registaraj Organizoj kun konsulta statuso kun Unuiĝintaj Nacioj (CONGO)	1
Bonveniga prelego de Sinjoro Ricardo Espinosa, Interrilata Oficejo por NRO-oj, UNOG : <i>Plurlingveco kaj Unuiĝintaj Nacioj</i>	1
Salutojn de Sinjorino Anna Biondi, Unua Vic-Prezidanto de CONGO : <i>Lingvaj rajtoj kaj universalaj valoroj</i>	1
Inaŭgura prelego de Profesoro Probal Dasgupta, Prezidanto de UEA <i>Substantivaj lingvaj rajtoj</i>	1
Sinjoro Dietrich Weidmann, Kun-Prezidanto de la Svisa Esperanto-Societo : <i>Homaj rajtoj kaj komunikado</i>	2
Ĉefa prelego de Profesorino Tove Skutnabb-Kangas : <i>Lingvo, edukado, kaj (malobservoj de) homaj rajtoj</i>	3
<i>Subtraha (forprena) edukado</i> <i>Kial malaperas lingvoj ?</i> <i>"Mortigaj" lingvoj kaj lingva genocido</i> <i>Malobservoj de rajtoj al edukado</i> <i>Lingvaj homaj rajtoj en edukado</i> <i>Instrumentoj por lingvaj homaj rajtoj</i> <i>Progreso en edukado</i> <i>Biodiverseco</i>	
Gast-prelego de Profesoro François Grin, Fakulo de traduko kaj interpreto (ETI), Universitato de Ĝenevo : <i>Interkomprenado kiel strategio por lingva justeco</i>	6
Sinjoro Michele Gazzola, Fakulo de traduko kaj interpreto (ETI), Universitato de Ĝenevo : <i>Lingva diverseco kaj universitata instruado</i>	6
Indiĝenaj popoloj kaj lingvaj homaj rajtoj	7
Sinjoro John Mateo Lopez, reprezentanto de indiĝenaj popoloj de Kolombio : <i>Indiĝenaj popoloj kaj siaj lingvaj trezoroj el leĝa vidpunkto</i>	7
Ambasadoro Ronald Barnes, reprezentanto de la Alaskaj Triboj : <i>Lingvo, komunikado, kaj Aŭtonomeco</i>	8
Sinjorino Flor Rayen Calfunao Paillalef, reprezentanto de la Mapucha Nacio, Ĉilio : <i>Lingvaj rajtoj de la Mapucha Popolo</i>	10
Konkludo	11
Referencoj	12
Aldonaĵo I-a : Listo de Partoprenantoj.....	15

Tagordo

- 09.00-10.00 **Malfermo de la Simpozio kaj salutoj**
Prezidantoj : Probal Dasgupta kaj Renate Bloem
- **Sinjoro Ricardo Espinosa,**
Estro, Internacia Oficejo por NRO-oj, Estro, Oficejo de la Ĝenerala Direktoro, Oficejo de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo
 - **Sinjinoro. Anna Biondi,** Unua Vic-Prezidanto de **CONGO**, mesaĝo de Sinjoro Liberato Bautista, Prezidanto de CONGO
Lingvaj rajtoj kaj universalaj valoroj
 - **Profesoro Probal Dasgupta,** Prezidanto de UEA:
Substantivaj lingvaj rajtoj
 - **Sinjoro Dietrich Michael Weidmann,**
Kun-Prezidanto de la Svisa Esperanto Societo (SES)
- 10.00-11.00 Ĉef-prelego : **Profesoro Tove Skutnabb-Kangas:**
Lingvo, edukado, kaj (malobservoj de) homaj rajtoj
- 11.00-11.15 - Kafpaŭzo
- 11.15-12.00 Gast-preleganto : **Professor François Grin:**
Interkomprenado kiel strategio por lingva justeco.
- 12.00-12.30 - Ĝenerala debato
- 12.30-14.00 - Tagmanĝ-paŭzo
- 14.00-14.30 Prezentado de Sinjoro John Mateo Lopez, reprezentanto de indiĝenaj popoloj de Kolombio :
Indiĝenaj popoloj kaj siaj lingvaj trezoroj de leĝa vidpunkto
Prezentado de Ambasadoro Ronald Barnes, reprezentanto de la Alaskaj Triboj :
Lingvo, komunikado, kaj aŭtonomeco
- 14.30-15.00 Sinjoro Michele Gazzola, Fakulo de traduko kaj interpreto (ETI), Universitato de Ĝenevo :
Lingva diverseco kaj universitata instruado
- 15.00-15.30 Mallongaj intervenoj de NRO-oj
Interveno de Sinjinoro Flor Rayen Calfunao Paillalef, reprezentanto de la Mapucha Nacio, Ĉilio :
Lingvaj rajtoj de la Mapucha Popolo
- 15.30-15.45 - Kafpaŭzo
- 15.45-16.15 - Ĝenerala debato
- 16.15-16.30 Konkludaj komentoj de la **Prezidanto de UEA** kaj Fermo de la Simpozio

Lingvaj Rajtoj en la Mondo : la nuna situacio

UNO Ĝenevo, la 24-an de Aprilo 2008

La kadro de Unuiĝintaj Nacioj (UNO) en ĝia bela parko kaj la bela printempa tago kontribuis al la sukceso de la Simpozio, kiel ankaŭ la intereso kaj atento kiujn montris la partoprenantoj. La simpozio memorigis kaj la Centjariĝon de la Universala Esperanto Asocio, kaj la 60-an datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. La celo de UEA en tiu Simpozio estis substreki lingvaj rajtojn, kiujn ĝi defendas ekde multajn jarojn, kaj kiuj ŝajnas kaj gravaj kaj neglektitaj hodiaŭ.

La kunvenon malfermis Sinjorino Renate Bloem, eksa-Prezidanto de la Konferenco de Ne-Registaraj Organizoj kun konsulta statuso kun Unuiĝintaj Nacioj (CONGO), kiu kunprezidis la kunvenon kun Profesoro Probal Dasgupta, Prezidanto de UEA. Dum sia varma salutado, ŝi gratulis UEA-on pro ĝiaj celoj por paco kaj interkompreno inter popoloj kaj aparte pro ĝia rolo en la subteno de lingvaj rajtoj de minoritataj grupoj. Ŝi ankaŭ substrekis la gravecon de lingvaj rajtoj en la konteksto de tutmondiĝo kaj la scio-societo, kaj la aliro de ĉiuj popoloj al informoj kaj scio en la propra lingvo.

Plurlingveco kaj UNO

Sinjoro Ricardo Espinosa, estro de la Interrilata Oficejo kun NRO-oj, Oficejo de la Ĝenerala Direktoro, Oficejo de UNO en Ĝenevo, en sia bonveniga prelego substrekis la fortan, longdaŭran partnerecon inter UNO kaj NRO-oj — civilsociaj organizoj kiuj fariĝis bezonataj aktoroj en plurflankaj debatoj. Kulturo kaj komunikado estas tre gravaj por Unuiĝintaj Nacioj : kiam oni traktas kun homoj el malsamaj landoj oni devas trovi komunikad-lingvon. Sinjoro Espinosa citis fakulon pri la temo kiu diris ke, se kunveno okazas en nur unu lingvo, la kvalito de la aranĝo estas reduktita je pli ol 40%. Li rekonis ke dum ĉiutaga laboro ĉe UNO la ekvilibro de lingvoj suferas, kaj unu lingvo estas privilegiita. Multaj registaraj delegitoj ne kapablas sin esprimi sufiĉe bone, kaj ankaŭ ne la NRO-aj delegitoj, kiuj tro ofte estas flankenmetitaj, aparte kiam samtempa interpretado ne estas provizita, ankaŭ ne en la oficialaj lingvoj de UNO. Sinjoro Espinosa prononcis kelkajn vortojn en Esperanto por rekoni la konscion de UEA pri tiu problemoj kaj la solvon proponita de UEA, referante al la Praga Manifesto¹ kiu difinas la principojn de UEA, kiuj estas tre proksimaj al tiuj de UNO : demokrateco, edukado, plurlingvismo, lingvaj rajtoj kaj kultura diverseco, kaj finfine homa emancipo.

Lingvaj rajtoj kaj universalaj valoroj

Sinjorino Anna Biondi, Unua Vic-Prezidanto de CONGO, ankaŭ salutis la simpozion per kelkaj vortoj en Esperanto. Rememorante sian laboron kun sindikatoj, ŝi esprimis la senton, ke ambaŭ movadoj kundividis komunajn celojn: egalaj rajtoj kiel universalaj rajtoj en tutmondiĝita mondo. La labora movado naskiĝis samtempe kiel Esperanto, dum epoko kiam universalaj valoroj bezonatis. Ŝi parolis pri la efiko de tutmondiĝo je kultura identeco kaj lingvo, kaj substrekis la filozofion de Esperanto kiel neŭtrala lingvo kaj simbolo de paco, la gravecon de ĝia rolo por kunigi grupojn da homoj de ĉiuj kulturaj devenoj kaj provizi aliron al ĉiuj internaciaj kulturoj, kreskigante tutmondan interkomprenon kaj toleremon, reciproke respekton kaj forigon de diskriminacio. Ŝi observis ke la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj estis kreata je simila bazo, por antaŭenigi dialogon inter nacioj. Ŝi kuraĝigis UEA-on uzi la oportunojn kiujn ofertas la Interreto kaj substrekis ties gravecon provizante forumon, por ke minoritataj popoloj uzu sian gepatran lingvon. Post 100 jaroj, Esperanto atingis maturecon, kunmetante la idealon fortigi la homan komunumon pere de komuna lingvo kun agnosko de la interdependeco kaj interrelateco de nia lingva heredaĵo. La Esperanta movado estas je la kerno de la defioj de tutmondiĝo.

Substantivaj lingvaj rajtoj

Antaŭ ol prezenti sian prelegon, Profesoro Probal Dasgupta diris ke li vidas la ĉefan rolon de Esperanto nuntempe kiel interregionan lingvon por interkonekti minoritatojn. Temas pri rolo, kiun la angla ne povas plenumi ĉar ĝi subpremas regionajn specifojn.

En lia prelego pri substantivaj lingvaj rajtoj, li rememoris ke UNO deklaris 2008 kiel Internacia Jaro de Lingvoj por pritrakti la maltrankviligan perdon de lingvoj kaj la erozion de komunumoj. La fakto ke UEA vidas la neŭtralan karakteron de Esperanto kiel remedo por la konservo de endanĝerigitaj lingvoj estas bone konata. Li daŭrigis esplorante kelkajn malpli bone konatajn kampojn de la laboro de la Esperanto-movado : ekzemple, klera esplorado en la kampo de lingva politiko kun la kreado de la *Journal of Language Policy and Language Planning*² (Revuo de Lingva Politiko kaj Lingva Planado), kaj la sekvanta progreso en la kampo de socia scienco pri lingvaj rajtoj. Cetere, gravas ne limigi la diskuton pri perdo de lingva diverseco al la ekonomia flanko de la problemoj. La celo de esperantistoj koncernas ne nur aliro al demokrataj formoj, sed etendigo de la substantiva socia bonfarto de civitanoj al la lingva kampo.

Esperanto kutime estas laŭdata pro sia facila lernado, tamen ĝi ofte ludas rolon por plibonigi lingvan konscion. Ekzemple, la uzo de afiksoj en Esperanto, kiel en *skrib-il-ar-ĉj-o*, kiu konsistas el : radiko - ilo - agregaĵo - loko - substantivo, kiuj tiam povas esti uzataj por konstrui multajn aliajn vortojn. Tio akriĝas la kapablon de la lernanto percepti la vortan strukturon kaj tiel rapidigas la akiron de fremda lingvo (la propedeŭtika efiko). Aldone al ĉi tio, estas la kultivo de la konscio pri kiel ni estas konektigitaj al niaj mensaj kaj fizikaj ĉirkaŭaĵoj: per ĝia kontribuo al tiu konscio, Esperanto preterpasas nuran utilecon kiel faciligilo por fremdaj lingvoj.

Oni emus konsideri, ekzemple, rimedoj por maksimumigi publikan aliron al leĝaj sistemoj kiuj substrekas la temon de lingva faciligo, eĉ kiam temas pri nur unu lingvo. Eksa Prezidanto de Usono, Jimmy Carter, instigis leĝdonadon por simpligi la lingvon, devigante la afiŝaĵon de simplaj lingvaj priskriboj de la respondecoj de la institucioj kaj de la rajtoj de civitanoj. La movado de barataj *dalitoj* (antaŭe nomitaj "netuŝebluloj") por akiri socian dignecon estas puŝanta por inversigi la elit-drivantajn vortuzadan opakecon de akademias kaj oficialaj tekstoj en barataj lingvoj. En Japanio, stariĝas simila projekto por favorigi la uzadon de facilaj legeblaj silabaj skribsignoj. Nur instigaj bazitaj sur la prototipa facila lingvo Esperanto signifas serĉadon de komuna fadeno — kaj konekto kun lingvaj rajtoj — en ĉi tiuj provoj maksimumigi la traveblon de lingva uzo, eĉ en unulingvaj kontekstoj.

Tamen, kvankam veras, ke la mondo perdas multajn lingvojn kaj multaj individuoj spertas la perdon de la gepatra lingvo, estus erare limigi nin al grava — sed tro strikte leĝa — entrepreno vidi la ideon de lingvaj rajtoj simple kiel la rajto uzi la gepatran lingvon. Eĉ tuta sukcesa kampanjo por subteni formalan egalecon de rajtoj malprobablas realigi substantivan demokration.

Interesa, konsiderinda kazo estas la metodo de Kanado por certigi lingvan egalecon inter siaj franc- kaj anglaparolantaj loĝantaro. Laŭ lastatempa studo,³ literaturaj tradukoj finance subtenataj de la registaro estas perceptitaj de la legantoj kiel mallertaj kaj tro fervoraj. La sekvo estas, ke homoj trovas alternativajn manierojn traduki por atingi pli aŭtentikajn rezultojn. La registaro, aranĝante burokratan, artefaritan amasan tradukadon el fortaj lingvoj, nur ŝajnas doni al parolantoj de minoritataj lingvoj aliron al ilia gepatra lingvo — sen ke ili ricevu seriozan enhavon gepatralingve en la oficiala (inkluzive eduka) kampo. Necesas intelektajn ilojn por diagnozi kiel patologian tian neseriozan aplikadon de lingvo-rajta leĝo. La socia scienca aliro, ekonomie fokusita, malgraŭ tio, ke ĝi estas grava progreso, ne provizas la bonan diagnozon en tiaj scenaroj.

Minoritataj parol-komunumoj bezonas certigi, ke iliaj ideoj estas elparoligitaj kaj aŭskultitaj. Esperanto havas rolon por ludi en tiu konteksto, faciligante komunikadon je malsamaj niveloj kaj inter malsamaj grupoj.

Profesoro Dasgupta finis sian prelegon per salutadoj etendigitaj al Ĝenevo kaj li aparte salutis du eminentajn svisajn esperantistojn, la patron de struktura lingvistiko, Ferdinand de Saussure kaj lia frato René de Saussure.

Homaj rajtoj kaj komunikado

Sinjoro Dietrich Weidmann, Kun-Prezidanto de la Svisa Esperanto Societo, parolante en Esperanto, rememorigis la rolon de Edmond Privat kaj Hector Hodler kiel fondantoj de la Universala Esperanto Asocio en Ĝenevo. Fakte, Edmond Privat renkontis la Prezidanton de Usono Wilson antaŭ pli ol 100 jaroj, kaj ili pridiskutis la ideon de tutmonda federacio de ŝtatoj sur la bazo de fundamentaj homaj rajtoj, kiu, post la Unua Mondmilito, iĝis la Ligo de Nacioj.

Referante al la 60-a Datreveno de la Deklaracio pri Homaj Rajtoj, Sinjoro Weidmann atentigis ke, kvankam ni povus esti pesimismaj pri la homrajta situacio en la mondo kaj vidi la glason ankoraŭ duonmalplena de tiu vidpunkto, ni povus ankaŭ rigardi tra optimismaj okulvitraj kaj vidi ke ni havas bonan kialon por celebri hodiaŭ, ĉar la glaso certe ankaŭ estas duonplena kaj la homaro faris grandan progreson dum la lastaj 60 jaroj. Estas neniu lando surtere en kiu homaj rajtoj ne estas konsiderataj, kaj neniu krimo kontraŭ la homa dignecon povas okazi, sen ke la mondo observu kaj komdemnu ĝin.

Tamen, ni devas samtempe konstati ke la plej belaj leĝoj, reguloj kaj rajtoj restas ĉifaĵo, tiom longe kiom ne ĉiuj individuoj scias siajn rajtojn kaj havas la eblecon sin defendi. Homaj rajtoj postulas egalecon por ĉiu homo, sed ĉu individuo povas taksu kaj defendi sian bazajn homajn rajtojn tutegalece se li/ŝi ne povas tion fari en lingvo kiun li/ŝi kapablas regi sen pagi multelkostajn interpretistojn kaj tradukistojn? Se individuo devas defendi siajn interesojn en lingvo kiu estas fremda por li/ŝi, tiam oni ne povas paroli pri egaleco kaj tio konsistigas malobservon de unu el la plej bazaj homaj rajtoj. La homa rajto al egaleco tiel devas enhavi la rajton al lingva egaleco, kaj la rajto al libereco enhavas la rajton al lingva libereco. En tiu senco, la Esperanto-Movado defendas homajn rajtojn ekde ĝia ekesto, kaj oni povas diri ke la celoj de Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, la Universala Esperanto-Asocio kaj la Svisa Esperanto-Societo estas komunaj — tio estas, la kreado de pli bona, pli sekura kaj pli justa mondo, en kiu la homaro havos pli prosperan futuron en paca kaj reciproka interkompreno.

Lingvo, eduko kaj (malobservoj de) homaj rajtoj

La ĉef-preleganto, Profesoro Tove Skutnabb-Kangas, fama lingvistino kaj defendanto de lingvaj rajtoj, parolis pri la malobservo de la rajto al eduko kiun suferas indiĝenaj kaj minoritataj infanoj en la plejmulto da landoj hodiaŭ. Referante, kiel faris aliaj prelegantoj, al Marie Smith Jones, la lasta parolanto de la Eyak-lingvo, kies fotografio presidis la kunvenon, ŝi diris ke lingvoj estas mortantaj pli rapide ol iam ajn antaŭe — la duono aŭ pli estos malaperintaj ĝis ĉirkaŭ 2100.



Subtraha (forprena) instruo

La plej grava pedagoga kialo por la malapero de lingvoj, kaj la tiel nomata analfabetismo, estas la malbona instru-rimedo — tio estas, subtraha instruo pere de superreganta lingvo kiu ofte anstataŭas la gepatran lingvon de la indiĝena aŭ minoritata infano. Ĝi subtrahas de ilia lingva repertuaro. Aldona instruo, tamen, laŭ kiu dulingvaj instruistoj instruas infanojn per la gepatra lingvo, aldonas al la repertuaro de la infano kaj igas ilin dulingvaj aŭ plurlingvaj.

Kial lingvoj malaperas ?

Oni foje nomas lingvojn la vastaj bibliotekoj de la netuŝebla homa heredaĵo. Estas du paradigmoj por lingva malapero : morto aŭ mortigo. Se temas pri morto, ili mortas nature kiel estaĵoj en la naturo, aŭ ili mem estas mortigataj, kiam alia lingvo estas elektata volonte, por akiri pli bonajn postenojn aŭ pro alia kialo. Se lingvoj estas mortigataj, tiam analizo montras ke instru-sistemoj kaj amasmedioj partoprenas lingvan kaj kulturen genocidon, laŭ difinoj de UNO (vidu suben). Profesoro Skutnabb-Kangas kredas ke la plejmulto de malaperintaj lingvoj estas viktimoj de lingva genocido.⁴ Tiel, instru-sistemoj kaj amasmedioj estas la plej gravaj rektaj agentoj de lingva kaj kultura genocido. Malantaŭ ili, troviĝas la ekonomiaj, tekno-militaj kaj politikaj sistemoj de la mondo.

"Mortigaj" lingvoj kaj lingva genocido

Kiam infanoj estas instruataj per la subtraha (forprena) metodo pere de rimedo de superreganta lingvo, tiu ĉi lingvo povas iĝi "mortiga" lingvo, prezentante seriozan minacon al lingva diverseco pro ĝia superregeco. Tiu termino ilustras la rilaton inter homoj, ne estas karakterizo de la lingvo — temas pri relato de povo. Nuntempe, la superrega lingvo estas la angla, sed iu ajn lingvo povas iĝi "mortiga" lingvo, ekzemple la hispana, la hindia. En la kazo de surduloj, parola lingvo kaj lip-legado povas roli kiel "mortigaj" lingvoj elpuŝante la gestolingvon, aŭ la Usona Gesto Lingvo povas iĝi "mortiga" lingvo vid-al-vid aliaj gestolingvoj.

Unu kialo por ke lingvaj homaj rajtoj necesas en la instruo kaj konservo de ĉiuj lingvoj de la mondo, estas kontraŭstari krimojn kontraŭ la homaro, ankaŭ en instruado. Profesoro Skutnabb-Kangas observis ke la termino "lingva genocido" ne estas troiĝo. La Internacia Konvencio de UNO pri la Malebligo kaj Puno de la Krimo de Genocido (E793, 1948) enhavas kvin difinojn de genocido, kaj du el ili taŭgas por la nuntempa instruo de la indiĝenoj kaj minoritatoj.

Artikolo II (e) Perforte transigi infanojn de la grupo al alia grupo.

Artikolo II (b) Damaĝigi korpe au mense membrojn de la grupo.⁵

Por tion ilustru, Profesoro Skutnabb-Kangas citis tri ekzemplojn :

1. Studo de finnparolantoj en Svedio kiuj estis edukitaj nur en la sveda. Kiam ili havis infanojn, neniu parolis la finnan al siaj infanoj, eĉ se ili ne estis forgesinta ĝin. Ĉi tiuj infanoj tiel estis perforte transigitaj al alia grupo. Tia asimila instruo estas genocida.
2. Grupo de 1500 lernantoj en Zambio kaj Malavo. Multe el la lernantoj en Zambio kiuj estis instruitaj tute en la angla havis tre malfortan aŭ nulan leg-kompetencon en du lingvoj, sed ne kapablis skribi en iu ajn lingvo. En Malavo, lernantoj instruitaj en siaj propraj lingvoj dum kvar jaroj antaŭ ol esti transigitaj al angla medio, havis iomete pli bonajn rezultojn en siaj propraj lingvoj kaj ankaŭ en la angla. La konkludo estas, ke estas risko ke la politiko uzi la anglan kiel medio povus kontribui al nanigo pli ol plibonigo de akademia kaj kona intelekta kresko. Tio akordas kun la difino de UNO de genocido, kiu parolas pri kaŭzado de mensa damaĝo.
3. En Kanada studo de Inuitoj instruitaj en la angla : ili kapablis nek paroli nek legi aŭ en sia propra lingvo aŭ en la angla, kaj ne atingis bonan ĝeneralan nivelon de instruo post naŭ jaroj de edukado, kvankam estante de normala inteligenteco. Tio ankaŭ konsistigas kaŭzon de mensa damaĝo al la infanoj.

La plejmulto de minoritata eduko en la mondo kontribuas al lingva kaj kultura genocido laŭ la difinoj de la Konvencio de UNO.

Malobservoj de la rajto al edukado

Profesoro Skutnabb-Kangas jam estas raportinta pri pluraj aspektoj de malobservo de la rajto al edukado, kun referencoj al pluraj Hom-Rajtaj dokumentoj kaj al la Konvencio de UNO pri la Rajtoj de Infanoj, en la konteksto de la Konstanta Forumo pri Indiĝenaj Aferoj.⁶

Instrui indiĝenajn kaj minoritatajn infanojn subtrahe pere de superrega lingvo aŭ kun frua transigo al instruo per superrega lingvo konsistigas malobservon de tiu rajto kaj estas konata kiel domaĝema al infanoj. Subtrahaj edukaj politikoj starigitaj en plena konscio de la ruiniga efiko al infanoj povas esti taksitaj kiel internaciaj krimoj, inkluzive genocido. Ŝtatoj daŭrigas tiujn politikojn, kvankam ili scias ke ili havas ege damaĝajn konsekvencojn, inkluzive gravan mensan damaĝon, socian disrompon, malriĉecon; ekonomian, socian kaj politikan marĝenigon kaj, long-daŭre, alkoholismon, perforton kaj eĉ mem-mortigon.

La pluraj formoj de subtraha instruo al kio indiĝenaj infanoj estis submetitaj rezultas en tre gravaj damaĝaj konsekvencoj, kaj mensaj kaj fizikaj. Tio konsistigas evidentan malobservon de tuta gamo de homrajtaj normoj kaj nuntempaj normoj de minoritata protekto.

La koncepto de krimo kontraŭ homaro estas malpli limiga ol genocido kaj povas ankaŭ aplikiĝi al tiuj instruformoj. La ruinigaj konsekvencoj ne nur por lingvoj sed ankaŭ por la vivoj de indiĝenaj popoloj kaj minoritatoj nun estas evidentaj.

La koncepto de krimo kontraŭ homaro provizas bonan bazon por evoluigo de leĝa punado de subtraha edukad-praktikoj kaj politikoj.^{7,8}

Lingvaj homaj rajtoj en edukado

Lingvaj homaj rajtoj en edukado estas antaŭkondiĉo, bezonata sed nesufiĉa, en la batalo por ĉesigi lingvan genocidon kaj krimojn kontraŭ la homaro. Sen ili, minoritato kies infanoj iras al la lernejo kutime devas akcepti subtrahan instruon pere de rega/plimulta lingvo. Ĝi ne povas sin reprodukti kiel minoritato kaj ne povas integriĝi sed estas devigita sin asimili. Lingvaj homaj rajtoj necesas por konservi lingvan kaj kulturan diversecon — kaj kiel interliga faktoro por konservi biodiversecon.

La plej grava lingva homa rajto en edukado estas instruo per la gepatra lingvo en senpagaj lernejoj. Lingvaj homaj rajtoj povas konsistigi manieron ĉesigi lingvan genocidon pro subteno de integriĝo kaj defendo de homoj kontraŭ perforta asimilado, pozitivajn ŝtatajn politikojn al minoritatajn lingvojn, konservon de la lingva diverseco de la mondo, ĉesigon de konflikto kaj subtenon de aŭtonomeco, aparte por indiĝenaj popoloj.

Lingvaj homaj rajtoj enhavas iujn lingvaj rajtojn, kaj homajn rajtojn. Iuj homaj rajtoj estas tiom necesaj por digna vivo ke ili nepre videblas kiel neforigeblaj — neniu ŝtato aŭ individuo aŭ grupo estas permesita malobservi ilin : estas ĉi tiuj lingvaj rajtoj kiuj konsistigas lingvaj homajn rajtojn.⁹

Instrumentoj pri lingvaj homaj rajtoj

En multaj homrajtaj dokumentoj, lingvo konsistigas unu el la plej gravaj homaj karakterizoj, surbaze de kiuj homoj estas malpermesitaj suferi diskriminacion (kune kun sekso, raso kaj religio). Tamen, lingvo ofte malaperas el la eduk-temaj paragrafoj de devigaj instrumentoj. En multaj kazoj, la terminaro uzata estas tiom malpreciza kaj ambigua, ke la rezulto estas ke ŝtatoj povas interpreti la tekstojn kiel ili volas.

Profesoro Skutnabb-Kangas prezentis superrigardon de ekzistantaj homaj rajtoj instrumentoj, de kiuj la ĉi-suba elĉerpo montras ke :

- En la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, la paragrafo pri edukado tute ne referas al lingvo.¹⁰
- La Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj¹¹ mencias lingvon en la ĝenerala paragrafo kune kun raso, koloro, sekso kaj religio, sed ne en la rubriko pri edukado. Sed la rubriko pri edukado ja referas al rasaj, etnaj aŭ religiaj grupoj, ne al lingvaj grupoj.
- La Deklaracio de UNO pri Rajtoj de Homaj Apartenantaj al Naciaj aŭ Etnaj, Religiaj kaj Lingvaj Minoritatoj¹², en la paragrafo pri edukado, nur uzas provizoran kaj nedifinan tekston.
- La Kadra Konvencio de la Konsilio de Eŭropo por Protekto de Naciaj Minoritatoj kaj la Ĉarto por Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj¹³ ambaŭ uzas kondiĉan formulon, kiu donas al ŝtatoj evitilon por ne apliki la postulojn de la Kadra Konvencio, aŭ de la Ĉarto, kiuj efektive reprenas la rajtojn kiujn ili akordas.

La Internacia Traktato pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj¹⁴ (Artikolo 27) ankoraŭ akordas la plej bonan devigitan protekton por lingvaj rajtoj sed ankaŭ uzas terminaron kiu faciligas al ŝtatoj sin retiri aŭ interpreti ĝin, kiel ili volas :

"En tiuj ŝtatoj en kiuj etnaj, religiaj aŭ lingvaj minoritatoj ekzistas, al homoj apartenantaj al tiaj minoritatoj ne estos rifuzataj la rajton, en komunumo kun aliaj membroj de sia grupo, ĝui sian propran kulturon, profesi kaj praktiki sian propran religion, aŭ uzi sian propran lingvon."

La Ŝtato povas decidi ĉu grupo estas minoritato aŭ ne.

- La Hagaj Rekomendoj Rilate al Edukadaj Rajtoj de Naciaj Minoritatoj¹⁵ de la Alta Komisiono de OSCE pri Naciaj Minoritatoj deklaras, *"Por minoritatoj, instruado per gepatra lingvo estas rekomendata je ĉiuj niveloj, ankaŭ en meznivela edukado. Ĉi tio inkluzivas dulingvajn instruistojn en la rega lingvo kiel dua lingvo"*, sed tio nur estas rekomendo.
- Inter la plej lastatempaj homrajtoj instrumentoj, unu el la plej pozitivaj estas la Deklaracio de UNO pri Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj¹⁶, adoptita de Ĝenerala Asembleo per Rezolucio 61/295 la 13-an de septembro 2007.

La plej trafaj partoj estas Artikoloj 13 kaj 14.

Artikolo 13

1. Indiĝenaj popoloj rajtas revigligi, uzi, evoluigi kaj transdoni al futuraj generacioj siajn historiojn, lingvojn, parolajn tradiciojn, filozofiojn, skribsistemojn kaj literaturojn, kaj desegni kaj reteni siajn proprajn nomojn por komunumoj, lokoj kaj homoj.

2. Ŝtatoj uzos efikajn rimedojn por certigi ke tiu rajto estas protektita kaj ankaŭ por certigi ke indiĝenaj popoloj povas kompreni kaj esti komprenataj en politikaj, leĝaj kaj administrataj procedoj, kiam necesas, pere de provizo de interpretado aŭ aliaj taŭgaj rimedoj.

Artikolo 14

1. Indiĝenaj popoloj rajtas stari kaj regi siajn eduk-sistemojn kaj institucioj provizantaj edukon en siaj propraj lingvoj, en maniero taŭga al iliaj kulturaj metodaj de instruo kaj lerno.

2. Indiĝenaj individuoj, aparte infanoj, havas rajton al ĉiuj niveloj kaj formoj de eduko de la Ŝtato sen diskriminacio.

3. Ŝtatoj, kune kun indiĝenaj popoloj, uzos efikajn rimedojn, por ke indiĝenaj individuoj, aparte infanoj inkluzive tiujn, kiuj vivas ekster siaj komunumoj, havu aliron, kiam eblas, al eduko en sia propra kulturo kaj provizita en sia propra lingvo."

Tamen, kiel evidentas, denove la lingvo estas malpreciza kaj interpretebla, malgraŭ esti perlaborita dum pli ol 20 jaroj, kaj la teksto ne estas deviga. Eĉ tio ne estas sufiĉa.

Lingvaj homaj rajtoj en edukado efektive ne ekzistas.

Progreso en edukado

Kaj indiĝena kaj minoritata instruado povus esti organizita por promocii altajn nivelojn de multlingveco. Kelkaj promes-plenaj evoluoj ekzistas en Nepalo, Barato (Orissa), Etiopio, la lando de la samea popolo en Norvegio kaj Finnlando, Bolivio, Bangladeŝo kaj multaj aliaj, kaj ankaŭ en la eduko de surduloj, sed ĝenerale la plej multo de landoj estas hipokritaj, kaj bele paroladas sed malmulte agas.⁴

En pluraj el tiuj projektoj, indiĝenaj infanoj estas instruataj je bazlerneja nivelo en la gepatra lingvo dum la unuaj ok aŭ naŭ jaroj kun bonegaj rezultoj, aŭ dum kvar aŭ ses jaroj (kun iom malpli bonaj rezultoj), en kelkaj kazoj per materialoj kaj programoj planitaj de la vilaĝanoj. Planoj ekzistas por disvastigi tiajn projektojn. Ekzistas bonaj programoj por eduko de surduloj kaj bona trejnado de instruistoj, aparte en Finnlando.^{17,18}

Biodiverseco

Kiam ŝtatoj, inkluzive tiujn, kiuj voĉdonis kontraŭ la Deklaracio de UNO pri Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, rifuzas cedi al indiĝenaj popoloj kaj naciaj kaj enmigrantaj minoritatoj la senkondiĉan rajton esti edukata en sia gepatra lingvo, ili serioze damaĝas la koncernitajn infanojn, sin mem kaj la planedon. Manko de lingvaj rajtoj respondecas pro analfabeto, manko de instrua sukceso, eduka malŝparo, malbonaj vivaj ŝancoj, formortigo de lingvoj, malapero de grupoj, nacioj kaj popoloj — per trudita asimileco — kaj kontribuas al la malapero de tradicia scio pri diverseco.

Oni scias ke lingva diverseco kaj biodiverseco forte interrilatas. Scio pri konservo de biodiverseco estas enkodigita en malgrandaj lingvoj : kiam ni mortigas minoritatajn lingvojn, ni mortigas la antaŭkondiĉojn por konservi biodiversecon sur la tero. Se ni daŭrigas kiel nun, la plejmulto de la indiĝenaj lingvoj estos malaperintaj antaŭ 2100. Varieco kaj rezistemo estas vitalaj al postvivo, biokultura diverseco estas esenca pro longdaŭra planeda postvivo ĉar ĝi plibonigas kreemon, adaptiĝemon, kaj stabilecon. Uniformeco estas la plej malbona respondo al krizo. La homa raso estas ege malofita, konsiderante la malprobableco de sia ekzisto. Se ĝi estingiĝas, ne estus la sola speco kiu sin sabotis, sed la sola kiu povis eviti ĝin.¹⁹

Esperantistoj estas kelkaj el la homoj kiuj estas plej aktivaj en la mondo por eviti ĝin, kaj pro tio ili estas gratulindaj.

Interkompreno kiel strategio por lingva justeco

La gastparolanto, Profesoro François Grin parolis pri "Interkompreno kiel strategio por lingva justeco" — tio estas reciproka kompreno. Substrekante la socia, politika kaj scienca graveco de la temo de la simpozio, li sekve diskutis pri lingva justeco. Li komentis ke Esperanto estus solvo, eble unu el la plej promesdonaj solvoj de tiu problemo. Tamen, la politika konteksto ne ĉiam estas favora al Esperanto : por pluraj kialoj estas rezisto — longdaŭra kaj ofte neracia — al Esperanto. Kiam oni konsideras la socian, politikan kaj kulturen rolon kiun Esperanto povus ludi oni tial devas procedi singardeme. Profesoro Grin diris ke lingva justeco bezonas esti promociigata kaj ĝia graveco agnoskata pli ĝenerale. Li daŭrigis parolante pri interkompreno — reciproka kompreno — tio estas, la uzo de kapabloj en lingvoj kiuj aproksimiĝas al la gepatra lingvo. Se oni subtenas plurlingvismon kaj kuraĝigas reciprokan komprenon, tiu ĉi kondukas al pli ĝusta situacio kaj povus pretigi la vojon al evoluo en kiu Esperanto trovas sian lokon.

Profesoro Grin situigis tiun projekton en la konteksto de la problemoj de traduko kaj interpretado en la Eŭropa Unio (EU) kun ĝiaj 23 oficialaj lingvoj, kaj priskribis la projekton — kiu estas nur je komenca etapo — dum kiuj la lingvoj estas apartigitaj en rilataj grupoj, ekzemple, la franca, la itala, la portugala kaj la hispana estus en unu grupo; kaj la angla, la nederlanda kaj la germana en alia. Tio rezultos en 12 grupoj de rilataj lingvoj, kaj la ideo de interkompreno estas ke EU-funkciuloj kapablu kompreni (sed ne devige paroli) la aliajn lingvojn en sia grupo kaj ne bezonus tradukon kaj interpretadon en tiuj lingvoj. Tiel oni reduktus la direktojn de traduko kaj interpretado de 506 kun 23 lingvoj al 253 — la duono. Tio kuraĝigus plurlingvismon kaj ege reduktus la kostojn. Alia parto de la propono estas distribui la ŝparojn, post dedukti sumon uzota por trejnado en interkompreno, tiel ke la landoj kiuj plej multe klopodis lerni aliajn lingvojn ricevu pli. Tiumaniere, oni ankaŭ atingus pli altan nivelon de lingva justeco.

Pluraj aliaj projektoj estas konsiderataj — unu estas adopto de lingvo aldone al tiuj bezonataj en EU²⁰, alia estas turnado de lingvoj tiel ke ĉiu el ili estas uzata vice kaj fortaj lingvoj ne superregas (ekzemple, la angla, la hispana), kaj alia la uzo de pontlingvo kiel Esperanto.

La baza ideo restas sama, la granda intereso de interkompreno estas kuraĝigi plurlingvismon kaj akceli ĝustan pratikon, kondukante al nova vizio de komunikado en plurlingva kadro. En tiu kadro, Esperanto havas rolon por ludi.^{21, 22, 23}

Lingva diverseco kaj universitata instruo

Michele Gazzola parolis pri universitata instruo kaj la lingvaj demandoj rilataj al internaciismo, substrekante la rolon de universitatoj en novigo, kaj en ekonomio bazita sur scio. En 2000, la Eŭropa Unio lanĉis strategion, kies celo estis doni antaŭpuŝon al ĝia ekonomio per projekto por kunigi la Eŭropajn sistemojn de altnivela eduko ĝis 2010 kaj igi Eŭropajn universitatojn kompareble al tiuj de Nord Ameriko kaj kapabalaj konkurenci kun Aziaj landoj.

Por certigi la konkurencecon de universitatoj, du kondiĉoj endas plenumiĝi :

- 1) monprovizo ligita al kvalito de esplorado kaj uzo de indikiloj por mezuri la kvaliton de esplorado por komparaj kialoj.
- 2) mobileco de studentoj kaj esploristoj en Eŭropo, tio signifas ke esploristoj devas facile povi translokiĝi al la plej bonaj universitatoj, tiel plibonigante la kreadon de polusoj de bonegeco.

La evidenta defio kiun prezentas tiu propono estas tiu de konservado de lingva diverseco vid-al-vide la superregado de la angla lingvo. La plejmulto de gepatralingvaj kaj aliaj anglaparolantaj studentoj havas avantaĝon super la aliaj, aparte ĉar unu el la plej gravaj indikiloj (de bonegeco) estas la nombro de artikoloj eldonitaj en la angla, ĉar multaj prestiĝaj revuoj estas eldonitaj nur en la angla. Pluraj universitatoj nun proponas kursojn nur en la angla por allogi alilandajn studentojn,

ekzemple, la Politekniko de Turino kaj la Universitato de Ĝenevo kie kelkaj francparolantaj prelegantoj donas siajn kursojn en la angla al ĉefe francparolanta aŭditaro. Tiu situacio povus konduki al ekskludo de multe da studentoj kaj prelegantoj kiuj ne povus uzi sian propran lingvon. La trudo de unu lingvo rezultas en lingva maljusteco ne nur en scienca literaturo sed ankaŭ en internaciaj kongresoj kie angloparolantoj havas konsiderindan avantaĝon. Cetere, anglaparolantaj studentoj havas eĉ pli grandajn elektojn de eduko sen la devigo lerni aliajn lingvojn.

Por certigi lingvan diversecon, bezonatas lingva politiko kun kompensaj rimedoj por aliaj lingvaj komunumoj. Ekzemple, indikiloj de scienca altkvalito povus esti reformigitaj por ke sciencaj revuoj en aliaj lingvoj ol la angla havus pli da videbleco kaj pezo en internaciaj datumbazoj, tiel provizante forumojn kie esploristoj povas uzi sciajn proprajn lingvojn sen ke tiu elekto rezultu en malfavora takso vid-al-vid la bibliometriaj indikiloj por la universitatoj. Fremdlingva eduko por studentoj devus esti fortigita por kuraĝigi uzon de aliaj lingvoj en universitatoj. Por doni al neangloparolantaj landoj aliron al scienca literaturo, oni devintus provizi patentojn kaj aliajn intelektajn propraĵojn en la angla je pli malalta kosto ol tiu pagata de anglaparolantoj. Tiu rolo kiel formo de kompensado por la avantaĝoj, kiujn ĝuas anglaparolantoj pro la superrega pozicio de sia lingvo.

Indiĝenaj popoloj kaj lingvaj homaj rajtoj

Tri prelegantoj parolis nome de indiĝenaj popoloj : Sinjoro John Mateo Lopez (Kolombio), Ambasadoro Ronald Barnes (Alasko) kaj Sinjorino Flor Rayen Calfunao Paillalef (Ĉilio). Ili ilustris grandan parton de kion diris ĉefparolanto Profesoro Tove Skutknabb-Kangas en sia prezento.

Leĝa strukturo kaj lingvaj rajtoj



Sinjoro John Mateo Lopez parolis pri "Indiĝenaj popoloj kaj siaj lingvaj trezoroj de leĝa vidpunkto", indikante ke la situacio en Kolombio devus esti uzata kiel referenco por la tuta Amerindiana kontinento. En Kolombio, laŭ la lasta oficiala censo, 87 indiĝenaj popoloj estas identigitaj kaj ili parolas 64 malsamajn lingvojn. Ili konsistigas loĝantaron de 1.4 milionoj da homoj kaj korespondas al 3.4% de la Kolombia loĝantaro.

Sinjoro Lopez substrekis la bezonon havigi leĝan strukturon por certigi la protekton de la indiĝenaj popoloj, de iliaj teritorioj, lingvoj, kulturo kaj vivmaniero, aparte vid-al-vid nordsudaj rilatoj kaj tutmondiĝo. Li indikis ke, eĉ kiam leĝaj rimedoj estas uzataj, gravas certigi ke ili estu efektivigitaj. Kiam ili ne estas efektivigitaj, la rezultanta perdo de indiĝenaj kulturoj ne nur konsistas en malapero de lingva riĉeco, sed koncernas ankaŭ vivkvaliton, la bonfarton de la popolo kaj ĝian socian organizon. Konsiderante la socian krizon kaj la krizon kiun alfrontas indiĝenaj popoloj, estas devige rekonsideri la strukturon de la socio por aliri al pli justa socio.

Lingvo, komunikado kaj aŭtonomeco

Ambasadoro Ronald Barnes parolis pri "Lingvo, komunikado kaj aŭtonomeco". La alaskaj triboj, kiujn li reprezentas, faris plurajn diplomatajn protestojn kontraŭ Usono ĉar Alasko estis metita sur la listo de neaŭtonomaj teritorioj en 1946²⁴ kaj elmetita en 1959 kiam Alasko iĝis Ŝtato de Usono. Unu el la faraĵoj de Usono estis nei la rajton de Alaskanoj esti informitaj en siaj propraj lingvoj. Kiel montrite en pluraj rezolucioj de la Unuiĝintaj Nacioj (UN), lingvo, komunikado kaj aŭtonomeco iras mano-en-mano. Laŭ Artikolo 1 de la Internacia Kontrakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj¹⁴ :

"1. Ĉiuj popoloj havas la rajton al aŭtonomeco. Laŭ aŭtoritato de tiu rajto, ili libere decidus sian politikan statuson kaj libere sin dediĉas al sia ekonomia, socia kaj kultura evoluo."

Lingvo estas imanenta atributo de kulturo, kaj kiam oni parolas pri politika rajto kaj kunligas ĝin kun ekonomia, socia kaj kultura rajtoj, tio signifas ke ni havas la rajton al ekonomia evoluo, socia evoluo kaj kultura evoluo. Pro tio, la indiĝenaj popoloj de Alasko havis, sub la dekoloniiga procedo, la rajton esti informitaj en siaj propra lingvoj. En 1949, rezolucio 328 de la Ĝenerala Asembleo de UNO²⁵ estis adoptita :

"La Ĝenerala Asembleo

1. *Invitas la Administrantajn Membrojn uzi rimedojn, kiam bezonas, por starigi egalan traktadon en aferoj kiuj rilatas al eduko inter loĝantoj de Ne-Aŭtonomaj Teritorioj sub ilia administro, ĉu ili estu indiĝenaj aŭ ne."*

Dum la debatoj de la Malneta Deklaro pri Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, usona diplomato prezentis temon de disputo, deklarante ke ne ekzistas rezolucio adoptita de la Ĝenerala Asembleo de UN kiu uzas la terminon "indiĝenaj popoloj". Ambasadoro Barnes indikis ke tio ne veras, rezolucio 329 de la Ĝenerala Asembleo de UNO²⁶ de 1949 deklaras :

"La Ĝenerala Asembleo

Agnoskante la gravecon de konservo kaj evoluo de lingvoj de la indiĝenaj popoloj en la Ne-Aŭtonomiaj Teritorioj, kaj Kosciante la konsiderindajn paŝojn jam faritajn tiurilate per la Administrantaj Membroj,


1. *Invitas la Administrantajn Membrojn*

(a) *Kuraĝigi la uzon de indiĝenaj lingvoj en Teritorioj sub ilia administro;*

(b) *Igi tiujn lingvojn kie kaj kiam ajn eblas la lingvoj de instruado ... "*



Ni scias, ke Usono ne plenumis sian promeson nek faris leĝon pri siaj devigoj al la Alaskaj popoloj. Ambasadoro Barnes parolis pri Ĉefino Marie Smith Jones, Ĉefo de la Ejaka Nacio, kiun li bone konis kaj kun kiu li parolis tri tagoj antaŭ ŝia forpaso la 21-an de januaro 2008. Li akompanis ŝin al Uniĝintaj Nacioj en 2002, kaj ŝi faris prelegon ĉe la UN Konstanta Forumo pri Indiĝenaj Aferoj, priskribante kiel, kiam ŝi estis en la lernejo, la lernantoj ne estis permesitaj paroli siajn proprajn lingvojn, kiam ili iris eksteren dum la paŭzoj. Ŝi priskribis kiel ŝi estis punita pro parolado de sia lingvo ĉar unu el la aliaj infanoj informis pri ŝi; ŝi diris ke ĉiam estas unu kiu perfidas la aliajn.



Kompreneble, ni scias ke Usono ne plenumis siajn devigojn, alie la indiĝenaj popoloj de Alasko, la riĉa kulturo kaj la naŭ ĉefaj lingvoj de Alasko estintus protektitaj. Referante al la mapo, li diris ke li mem devenas de Centro Yup'iko, kaj li montris la etegan Ejakan teritorion. Li kaj aliaj Yup'ikaj infanoj estis senditaj al loĝernejoj kie ili estis instruataj en la Usona angla kaj malkuraĝigitaj paroli Yup'ikon.

Referante al la historio de dekoloniado kaj la rajto decidi la propran statuson, Ambasadoro Barnes citis Rezolucion 743²⁷ de la Ĝenerala Asembleo de UNO kiu deklaras ke :

"La Ĝenerala Asembleo,

Konsiderante ke, per rezolucio 445 (V) adoptita la 12-an de decembro 1950, ĝi aprobis la specialan raporton pri eduko redaktita en 1950 kiel mallongan sed pripensitan indikadon de la graveco de eduka progreso kaj de la problemoj ankoraŭ alfrontotaj en Ne-Aŭtonomaj Teritorioj,

Konscianta pri la posta raporto redaktita en 1953 de la Komitato de Informo pri Ne-Aŭtonomaj Teritorioj rilate al edukaj circumstancoj en tiuj Teritorioj,

2. Substrekas ke la celo de eduko en Ne-Aŭtonomaj Teritorioj estas :

(a) Evoluigi moralan kaj civitanan konscion kaj respondecon inter la popoloj, kaj ebligi ilin preni pligrandigantan parton de respondeco por konduki siajn aferojn ;

(b) Plialtigi la vivnivelon de la popoloj pere de helpo al plibonigo de ilia ekonomia produktiveco kaj san-normoj ;

(c) Promocii la socian progreson de la Teritorioj, prenante en konsideron la kulturajn valorojn kaj aspirojn de la koncernitaj popoloj ;

(d) Certigi la etendon de intelektuala evoluigo de la popoloj por provizi al ili aliron al ĉiuj niveloj de kulturo ; ..."

En aliaj rezolucioj pri la dekoloniiga procedo,²⁸⁻³¹ estas antaŭvidoj por ke indiĝenaj popoloj havu reprezentantojn kiuj povas ĉeesti kunvenojn ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj esti informitaj pri la dekoloniiga procedo kaj transdoni la informon al sia propra popolo en siaj propraj lingvoj. La popoloj de Alasko ne estis informitaj pri tiu rajto.

Frue en la jaroj 1920, Usono konstatis ke la indiĝenaj popoloj malhelpis ŝtatecon. Ili enkondukis leĝon pri alfabeteco kiu signifis ke, se la indiĝenaj popoloj volis voĉdoni, ili estis devigaj trapasi ekzamenon pri alfabeteco montrante ke ili kapablis legi kaj interpreti kelkajn paragrafojn de la Konstitucio de Usono, kaj skribi en la angla. En 1958, kiam ili devis voĉdoni por aŭ kontraŭ ŝtateco, pro tio ke la plejmulte da ili estis nealfabetaj, oni diris al ili kiel plenumi la voĉon "por prezervi kaj protekti ilian teron kaj rimedojn" kaj tiel voĉdonis por ŝtateco sen scii por kio ili voĉdonis. Se ili provis voĉdoni sed malsukcesis la ekzamenon, ili estis monpunitaj je \$500 aŭ kondamnitaj al ses monatoj en malliberejo. Oni neis al ili la rajton esti informitaj pri la dekoloniiga procedo ĉar ili ne estis informitaj en siaj propraj lingvoj.

Marie Smith Jones forpasis la 21-an de januaro 2008. La Ejaka lingvo mortis ĉar oni ne instruis al la infanoj la Ejakan en lernejoj, okazis neniu socia evoluigo. Kultura evoluo estas kunligita kun politikaj interesoj kaj ĉiuj estas aspektoj de la rajto al aŭtonomeco. La indiĝenaj popoloj de Alasko ne estis informitaj en siaj propraj lingvoj pri siaj rajtoj. Je la fino de la jaroj 1980, ili eksciis ke ili havis rajton al aŭtonomeco kaj sendependeco kaj ili komencis uzi civitanan reziston kaj informon de la popoloj en iliaj propraj lingvoj de siaj rajtoj.

La Yup'ikoj havis sian propran skriban lingvon, kiu estis disvolvigita de unu individuo kiu estis inspirita vidante aliajn popolojn kun skribaj lingvoj. Tiu montras ke ili ne estis neprogresinta popolo, sed popolo kiu havas sian propran kulturon. Ili havis multajn librojn verkitajn en la Yup'ika, sed la libroj estis konfiskitaj kaj forprenitaj ĝis Vaŝingtono kie la homoj ne havis aliron al ili. La popolo konservis ĉirkaŭ kvin el ili.

Konklude, Ambasadoro Barnes montris surbendigon de Marie Smith Jones, kiu diras preĝon en la Ejaka. Dum ŝia vivo, ŝi ĉiam estis promocianta la rajton al sendependeco kaj aŭtonomeco, kaj ŝi atentigis sian popolon kontraŭ tiuj, kiuj faras akordojn en ilia nomo sen plene informi ilin kaj sen ke la homoj sciu kion ili konsentis nek la konsekvencojn de sia konsento. Iu speco de neperforta civitana rezisto adoptita de la triboj de Alasko estas nepago de impostoj. Ambasadoro Barnes estis ordonita de la Saĝuloj de la triboj ne pagi impostojn, kaj li estas ekzilita ekde 5 jaroj ; li estus arestata se li reirus al Usono.^{32,33}

Lingvo, komunikado, kaj aŭtonomeco : Ambasadoro Barnes substrekis la gravecon povi paroli kaj esti informita en sia propra lingvo de siaj rajtoj, kiu estas fundamenta parto de homaj rajtoj kaj multfoje estis deklarita en rezolucioj de Unuiĝintaj Nacioj.

La Prezidanto dankis Ambasadoron Barnes pro lia prelego, kaj kunligis lian batalon por lingva demokracio kun tiu de la Esperanto-Movado, kiu ekde ĉiam estas klopodanta por lingva demokracio; li substrekis ke ĝi ne povas prosperi sen homaj rajtoj, kaj rediris ke li havas la subtenon de la UEA.

La lingvaj rajtoj de la popolo Mapuche



SinJORINO Flor Rayen Calfunao Paillalef el Ĉilio parolis pri la malfacila situacio de la popolo Mapuche en Ĉilio kaj Arĝentino, kiu de pluraj vidpunktoj respiegulas la sperton de Ambasadoro Barnes en Alasko; samkiel li, ŝi estas ekziligita kaj la plejmulto de ŝia familio estas en malliberejo. La Mapucha Nacio estas en la suda hemisfero de Sud Ameriko, regiono kiu nun estas okupita de la Ĉilia kaj Arĝentina Ŝtatoj. La Mapuchoj sukcesis konservi sian tradician lingvon, Mapudungun, kaj sian propran kulturon. Mapuche signifas "la homoj de la tero". La politika situacio ne ŝanĝis por la Mapucha popolo. Ili estas viktimoj de genocido, kiu komenciĝis per okupado de ilia teritorio.

En 1641, la Mapucha Nacio kaj la Hispana Imperio subskribis traktaton, per kiu la Hispana Krono agnoskis la teritorian aŭtonomecon de la Mapucha Nacio. Tiu traktato estis agnoskita internacie en 1643. Tiel ili iĝis sendependaj du jarcentojn antaŭ Ĉilio, kiu iĝis sendependa en 1818 kaj trudis la ĉilian pasporton al la Mapucha popolo. Ili rifuzis tion ĉar ĝi estis trudita; ili jam estis sendependaj kaj akceptado de la pasporto ankaŭ signifus akceptadon de la lingvo, do ili estus perdintaj sian identecon. La epoko de diktaturo estis tre malfacile por la Mapucha popolo, sed la malfacileco daŭras, aparte koncerne la konservon de ilia kulturo.

SinJORINO Calfunao estas en Ĝenevo ĉar ŝia tuta familio estas en malliberejo, eĉ trijara infano, kaj de Ĝenevo ŝi povas denunci la malobservojn de homaj rajtoj al la homrajtaj organizoj en Ĝenevo kaj aliloke. Kio okazas ja estas genocido ĉar la tuta Mapucha kulturo, lingvo kaj tradicioj malaperas. Infanoj estas delokigitaj per esti senditaj al lernejoj almenaŭ 25 kilometrojn for de siaj hejmoj kaj ili nur povas reiri hejmen por semajnfino unu fojon en du semajnoj. La plimulto de ĉi tiuj lernejoj estas regataj de la Eklezio, la infanoj devas leviĝi je la 5-a matene por diri preĝojn, tiel ke ili estas komplete detranĉitaj de siaj radikoj kaj sia kulturo. Lastatempe, juĝoj pri kvar aŭ kvin Mapuchanoj rezultis en ilia kondamno laŭ kontraŭ-teroristaj leĝoj [kiuj estis redaktita sub la diktaturo de Pinochet por akuzi Mapuchaj rezistantojn (*La Kontraŭ-terorisma Leĝo kaj la Leĝo de Interna Sekureco*³⁴)] kaj senditaj al malliberejo 800 kilometrojn for de siaj familioj. Eĉ 20 kilometroj estas malfacile, 800 kms estas du aŭ tri taga vojaĝo en buso kaj estas multe pli malfacila vojaĝo.

Okazas subpremo per la policistaro kaj la kvazaŭpolicistaro, ili protektas la arbaran industrion kaj la *latifundistas* (bienistoj) en Mapucha teritorio. La teritorioj estas okupitaj de la Ĉilia Ŝtato; estas pli da subpremo je la Ĉilia flanko ĉar la Mapuchoj ne estas agnoskitaj. Post la diktaturo, Prezidanto Aylwin promesis agnoski la Mapuchojn kiel komunumon, sed tio signifus ke ili estus disigitaj kaj denove detranĉitaj de siaj radikoj. Alia leĝo estis promulgita (la Indiĝena Leĝo³⁵) kiu deklaras, interalie, ke la tero ne povas esti vendita al tria partio kaj ke la homoj ne povas esti delokigitaj. La registaro eĉ ne respektas tiun leĝon kiun ĝi faris. La registaro promulgas leĝojn pri la Mapucha tero — ĝi ne havas la rajton tion fari, la tero apartenas al la Mapucha popolo.³⁶ La arbaristoj kaj la *latifundistas* estas germanoj, francoj kaj svisoj; SinJORINO Calfunao tute ne kontraŭas enmigradon, sed la rajtoj de la Mapucha popolo ne estas respektantaj. Nur la fakto denunci kion faras la registaro signifas ke ŝi estus malliberigita se ŝi reirus al Ĉilio. Ŝi estas la sola kiu povas paroli nome de la popolo kaj denunci la multajn malobservojn de homaj rajtoj. Pluraj Neregistaraj Organizoj ankaŭ laboras por la rajtoj de la Mapuchoj kaj oni petis al la Konsilio pri Homaj Rajtoj sendi observanton al Ĉilio por vidi mem kio okazas, sed ili ankoraŭ ne respondis.

Konkludo

En siaj konkludaj komentoj, Profesoro Dasgupta dankis la volontulajn interpretistojn kiuj prizorgis la tradukadon en la angla, la franca kaj Esperanto. Li esprimis sian deziron, ke tiu ĉi Simpozio signu la unuan en serio da sciencaj kunvenoj kiuj enfokusigu atenton al lingvaj rajtoj — grava sed neglektita parto de la Deklaracio pri Homaj Rajtoj.

Tiam li diris ke li ŝatus doni la lastan vorton al la ĉef-preleganto, Profesoro Tove Skutknabb-Kangas. Ŝi diris ke ŝi volis doni ekzemplon de tio, kiel scio povas esti perdita kiam lingvo malaperas. Grupo de sciencistoj en Skandinavio lastatempe malkovris, ke salmoj povas fraji en malgrandaj riveroj, kvankam oni ĉiam kredis ke ili nur tion faras en grandaj riveroj, sur kiuj multaj digoĵoj nun estas konstruitaj, kaŭzante maltrankvilon pri la kapablo de salmoj atingi siajn frajejojn. Ili eldonigis sian malkovron en scienca revuo kaj post la eldono anoj de la samea popolo kiuj loĝas en norda Skandinavio kontaktis ilin. "Ni povintus diri tion al vi," ili diris, "en nia lingvo ni havas vorton kiu signifas "*salmo kiu frajas en malgrandaj riveroj*." En tiu kazo, la scio ne estis perdita, sed retrovita. Ĝi povis esti dividigita se estis okazinta dialogon kun la parolantoj de la minoritata lingvo.



REFERENCOJ:

1. Manifesto de Prago pri la internacia lingvo Esperanto, 1996
<http://lingvo.org/>
2. Journal of Language Policy and Language Planning (*Revuo de Lingva Politiko kaj Lingva Planado*), John Benjamins Publishing Company
http://www.benjamins.com/cgi-bin/t_seriesview.cgi?series=LPLP
3. Simon, Sherry, 2006. *Translating Montreal: Episodes in the life of a divided city (Traduki Montrealon: epizodoj en la vivo de apartigita urbo)*. Montreal and Kingston/London/Ithaca: McGill-Queen's University Press.
4. *Linguistic Genocide in Education — or worldwide diversity and human rights? (Lingva genocido en eduko — aŭ tutmonda diverseco kaj homaj rajtoj?)* Tove Skutnabb-Kangas 2000, Mahwah, New Jersey: Lawrence Erlbaum (ankaŭ 2008, Delhi: Orient Longman).
5. UN International Convention on the Prevention and Punishment of the Crime of Genocide (*Internacia konvencio de UNO pri malpermeso kaj puno de la krimo de genocido*) (E793, 1948)
Artikolo II (e) Perforte transigi infanojn de la grupo al alia grupo.
Artikolo II (b) Damaĝigi korpe aŭ mense membrojn de la grupo.
http://www.unhchr.ch/html/menu3/b/p_genoci.htm
6. UN Convention on the Rights of the Child (*Konvencio de UNO pri la rajtoj de la infano*)
<http://www2.ohchr.org/english/law/crc.htm> and
UNICEF : <http://www.unicef.org/crc/>
7. Magga Ole Henrik, Nicolaisen Ida, Trask Mililani, Dunbar Robert & Skutnabb-Kangas Tove (2005). *Indigenous Children's Education and Indigenous Languages*. Expert paper written for the United Nations Permanent Forum on Indigenous Issues. (*Eduko de indiĝenaj infanoj kaj indiĝenaj lingvoj. Faka artikolo verkita por la Konstanta Forumo pri Indiĝenaj Aferoj*). New York: United Nations.
http://www.un.org/esa/socdev/unpfii/en/session_seventh.html
8. Dunbar Robert & Skutnabb-Kangas Tove (2008). *Forms of Education of Indigenous Children as Crimes Against Humanity?* Expert paper written for the United Nations Permanent Forum on Indigenous Issues (PFII). (*Formoj de eduko de indiĝenaj infanoj kiel krimoj kontraŭ la homaro ? Faka artikolo verkita por la Konstanta Forumo pri Indiĝenaj Aferoj*) New York: PFII. [En la sistemo de PFII : "Prezentita de Lars-Anders Baer, kunlabore kun Robert Dunbar, Tove Skutnabb-Kangas kaj Ole Henrik Magga"]
http://www.un.org/esa/socdev/unpfii/documents/E_C19_2008_7.pdf
9. *Human Rights and Language Policy in Education (Homaj rajtoj kaj lingva politiko en eduko)*, Tove Skutnabb-Kangas (University of Roskilde, Department of Languages and Culture, 3.1.5.; Åbo Akademi University, Department of Education, Vasa, Finland)
10. Universal Declaration of Human Rights (*Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj*)
<http://www.un.org/Overview/rights.html>
11. UN International Covenant on Economic, Social and Cultural Rights (*Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj*)
<http://www2.ohchr.org/english/law/cescr.htm>
12. Declaration on the Rights of Persons Belonging to National or Ethnic, Religious and Linguistic Minorities (*Deklaracio pri Rajtoj de Homaj Apartenantaj al Naciaj aŭ Etnaj, Religiaj kaj Lingvistikaj Minoritatoj*)
Adopted by General Assembly Resolution 47/135 of 18 December 1992
http://www.unhchr.ch/html/menu3/b/d_minori.htm
13. Council of Europe's Framework Convention for the Protection of National Minorities and The European Charter for Regional or Minority Languages (*La Kadra Konvencio de la Konsilio de Eŭropo por Protekto de Naciaj Minoritatoj kaj la Ĉarto por Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj*).
http://www.coe.int/t/dghl/monitoring/minorities/default_fr.asp
http://fr.wikipedia.org/wiki/Charte_européenne_des_langues_régionales_ou_minoritaires
<http://conventions.coe.int/treaty/EN/cadreprincipal.htm>, treaty numbers 148 and 15

14. The International Covenant on Civil and Political Rights (article 27) (*Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Artikolo 27*)
<http://www.hrweb.org/legal/cpr.html>
15. The Hague Recommendations Regarding the Education Rights of National Minorities from OSCE's High Commissioner on National Minorities (*La Hagaj Rekomendoj Rilate al Edukadoj de Naciaj Minoritatoj de la Alta Komisiono de OSCE*)
<http://www.osce.org/hcnm/>
16. United Nations Declaration on the Rights of Indigenous Peoples, Adopted by General Assembly Resolution 61/295 on 13 September 2007 (*Deklaracio de UNO pri Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj*)
<http://www.un.org/esa/socdev/unpfii/en/drip.html> & Wikipedia
17. Mohanty Ajit, Panda Minati, Phillipson Robert, Skutnabb-Kangas Tove (eds). *Multilingual Education for Social Justice: Globalising the Local (Multlingva eduko por socia justeco : tutmondigi la lokaĵon)*. New Delhi: Orient Blackswan [former Orient Longman]
18. Skutnabb-Kangas Tove & Heugh Kathleen. Multilingual education works — from the Periphery to the Centre (*Plurlingva eduko funkcias — de la periferio al la centro*) [nova titolo]. Orient BlackSwan New Delhi.
http://www.tove-skutnabb-kangas.org/en/most_recent_books.html
19. On Biolinguistic Diversity. Linking language, culture and (traditional) ecological knowledge (*Pri biolingva diverseco. Ligi lingvon, kulturon kaj (tradician) ekologian scion*). Tove Skutnabb-Kangas
http://www.uea.org/vikio/Artikoloj_De_Tove_Skutnabb-Kangas
Por plena listo de la eldonoj de Profesoro Skutnabb-Kangas : <http://www.akira.ruc.dk/~tovesk/> kaj *por eldonoj pri biodiverseco* : <http://www.terralingua.org/publications/intro.html>
20. Commission Européenne : Un Défi Salulaire — comment la Multiplicité de Langues pourrait consolider l'Europe (Rapport Maalouf) — Propositions du Groupe des Intellectuels pour le Dialogue Interculturel Constitué à l'initiative de la Commission Européenne, Bruxelles 2008 (*Eŭropa Komisiono : Bonfara defio — kiel la multeco de lingvoj povintus plifirmigi Eŭropon (Raporto Maalouf) — Proponoj de Grupo de Intelektuloj por interkultura dialogo starigita de la Eŭropa Komisiono, Bruselo 2008*)
http://ec.europa.eu/education/languages/pdf/doc1646_fr.pdf
21. Coûts et justice linguistique dans l'élargissement de l'Union européenne (*Kostoj kaj lingva justeco en la pligrandigo de la Eŭropa Unio*), François Grin
http://fr.wikipedia.org/wiki/Rapport_Grin
<http://www.russieonline.freesurf.fr/grin.htm>
22. DYLAN: Dynamique des langues et gestion de la diversité (*Dinamiko de lingvoj kaj rego de diverseco*)
http://www.dylan-project.org/Dylan_fr/home/home.php
23. L'enseignement des langues étrangères comme politique publique (*Instruo de fremdaj lingvoj kiel publika politiko*), François Grin, Professeur, Université de Genève, Directeur adjoint, SRED, N° 19 Septembre 2005.
Rapport établi à la demande du Haut Conseil de l'Evaluation de l'Ecole, France (Rapport Grin) (*Raporto verkita laŭ demando de la Alta Konsilio de Takso de Lernejoj, Francio (Raporto Grin)*)
http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport_Grin.pdf
24. UN General Assembly Resolution 66 (I). Transmission of Information under Article 73e of the Charter of 14 December 1946 (*Rezolucio 66 (I) de la Ĝenerala Asembleo de UNO. Transdono de informo laŭ artikolo 73e de la Ĉarto, 14a de decembro 1946*)
<http://daccessdds.un.org/doc/RESOLUTION/GEN/NR0/033/17/IMG/NR003317.pdf?OpenElement>
25. UN General Assembly Resolution 328 (IV). Equal treatment in matters relating to education in Non-Self-Governing Territories, 2 December 1949 (*Rezolucio 328 (IV) de la Ĝenerala Asembleo de UNO. Egala traktado en aferoj rilate al eduko en neaŭtonomaj teritorioj, 2a de decembro 1949*)
<http://daccessdds.un.org/doc/RESOLUTION/GEN/NR0/051/47/IMG/NR005147.pdf?OpenElement>
26. UN General Assembly Resolution 329 (IV). Language of Instruction in Non-Self-Governing Territories, 2 December 1949 (*Rezolucio 329 (IV) de la Ĝenerala Asembleo de UNO. Instrulingvo en neaŭtonomaj teritorioj, 2a de decembro 1949*).
<http://daccessdds.un.org/doc/RESOLUTION/GEN/NR0/051/48/IMG/NR005148.pdf?OpenElement>
27. UN General Assembly resolution 743 (VIII) : Educational conditions in Non-Self-Governing Territories, 27

November 1953 (*Rezolucio 743 (VIII) de la Ĝenerala Asembleo de UNO. Edukaj kondiĉoj en neaŭtonomaj teritorioj, 27a de novembro 1949*).

<http://daccessdds.un.org/doc/RESOLUTION/GEN/NR0/086/08/IMG/NR008608.pdf?OpenElement>

28. UN General Assembly Resolutions (*Rezolucioj de la Ĝenerala Asembleo de UNO*)
<http://www.un.org/documents/resga.htm>
United Nations Charter (*La Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj*)
<http://www.un.org/aboutun/charter/>
29. UN GA Resolution 742 (VIII) of 27 November 1953 : Factors which should be taken into account in deciding whether a Territory is or is not a Territory whose people have not yet attained a full measure of self-government. (*Rezolucio 742 (VIII) de la Ĝenerala Asembleo de UNO. Faktoroj konsiderendaj por decidi ĉu teritorio estas, aŭ ne estas, teritorio kies homoj ankoraŭ ne atingis plenan mezuron de aŭtonomeco, 27a de novembro 1953*).
[http://www.un.org/french/documents/view_doc.asp?symbol=A/RES/742%20\(VIII\)&Lang=F](http://www.un.org/french/documents/view_doc.asp?symbol=A/RES/742%20(VIII)&Lang=F)
30. General Assembly Resolution 744 (VIII) of 27 November 1953: Association of Representatives from Non-Self-Governing Territories in the Work of the Committee on Information from Non-Self-Governing Territories. (*Rezolucio 744 (VIII) de la Ĝenerala Asembleo de UNO de 27a de novembro 1953. Asocio de reprezentantoj de neaŭtonomaj teritorioj al la laboro de la Komitato pri informado de neaŭtonomaj teritorioj*).
[http://www.un.org/french/documents/view_doc.asp?symbol=A/RES/744\(VIII\)&Lang=F](http://www.un.org/french/documents/view_doc.asp?symbol=A/RES/744(VIII)&Lang=F)
31. UN GA Resolution 1469 (XIV) of 12 December 1959. Cessation of the transmission of information under Article 73 e of the Charter in respect of Alaska and Hawaii. (*Rezolucio 1469 (XIV) de la Ĝenerala Asembleo de UNO de 12a de decembro 1959. Ĉeso de transdono de informo laŭ Artikolo 73 e de la Ĉarto rilate al Alasko kaj Havajo*).
[http://www.un.org/french/documents/view_doc.asp?symbol=A/RES/1469\(XIV\)&Lang=F](http://www.un.org/french/documents/view_doc.asp?symbol=A/RES/1469(XIV)&Lang=F)
32. Expert Seminar on Treaties, Agreements and Other Constructive Arrangements between States and Indigenous Peoples, Geneva, 15-17 December 2003, UNHCR, Indigenous Peoples and the United Nations Charter: Decolonization : Background paper and Resolution adopted by the Elders Council of Tununak, 10 April 2002 (Annex I) prepared by Ambassador Ronald Barnes, Indigenous Peoples and Nations Coalition, Alaska. (*Faka seminario pri traktatoj, akordoj kaj aliaj konstruaj aranĝoj inter ŝtatoj kaj indiĝenaj popoloj, Genevo, 15-17 de decembro 2003, Alta Komisiono de UNO pri Rifuĝantoj, Indiĝenaj popoloj kaj la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj : Dekoloniigo : Informartikolo kaj rezolucio adoptita de la Saĝuloj de la Tununaka Konsilio, 10-a de aprilo 2002 (Aneksio I) preparita de Ambasadoro Ronald Barnes, Koalicio de Indiĝenaj Popoloj kaj Nacioj, Alasko*).
33. Indigenous Peoples and Nations Coalition Human Rights Committee Shadow Report in regard to the United States Implementation Report, March 2006 (*Analiza raporto de la Homrajta Komitato de la Koalicio por Indiĝenaj Popoloj kaj Nacioj rilate al la efektiva raporto de Usono, marto 2006*).
U.N.G.A.O.R., 14th Session, Annexes, Agenda item 36, Document A/4115.
Vidu ankaŭ "The International Legal Status of Native Alaska," by Russel Lawrence Barsh, published in Alaska Native News (July 1984), 4. 2, p. 35. ("La Internacia Leĝa statuso de indiĝena Alasko", de Russel Lawrence Barsh, eldonita en Alaska Native News (en la angla), julio 1984, 4. 2, p. 35).
http://alaskansfirst.org/Alaska_legal_status.pdf
34. Vidu ankaŭ : Indigenous Peoples' Human Rights Initiative (*Homrajta iniciato de Indiĝenaj Popoloj*) :
<http://www.hrusa.org/indig/reports/mapuche.shtml>
35. The Law for the Protection, Promotion and Development of Indigenous People (*Leĝo por la protekto, antaŭenigo kaj evoluo de Indiĝenaj Popoloj*) : LEY No 19.253 : Ley Indígena Fecha Publicación: 05.10.1993, Fecha Promulgación: 28.09.1993, Ministerio de Planificación y Cooperación, Última modificación: LEY 19.587 (13.11.1998)
http://www.uta.cl/masma/patri_edu/PDF/LeyIndigena.PDF
36. Convention (No. 169) concerning Indigenous and Tribal Peoples in Independent Countries, Adopted on 27 June 1989 by the General Conference of the International Labour Organisation at its seventy-sixth session, entry into force 5 September 1991 (*Konvencio (No. 169) rilate al Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj en sendependaj landoj, adoptita la 27-an de junio 1989 de la Ĝenerala Konferenco de la Internacia Organizo pri Laboro dum sia sepdek-sesa sesio, valid-dato la 5-a de septembro 1991*).
<http://www.unhchr.ch/html/menu3/b/62.htm>



ANEKSO I

Lingvaj Rajtoj en la Mondo : la nuna situacio UNO Ĝenevo, la 24-an de Aprilo 2008

Listo de partoprenantoj

Mr Héctor Alòs i Font	Kataluna Esperanto-Asocio, Sabadell, Hispanujo	h.alos@esperanto.cat
Ms Cyndi Barbara	Interpretisto	
Mr Ronald Barnes	Ambasadoro de Alaskaj Triboj, Svislando / Usono / Alasko	
Mr Carlo Baumgartner	UEA, Svislando	aliba@bluewin.ch
Ms Dorothée Baumgartner	UEA, Svislando	doroba@bluewin.ch
Ms Anna Biondi	Unua Vic-Prezidanto CONGO, Re prezentanto, Ĝeneva Oficejo ITUC, Svislando	anna.biondi@ituc-csi.org
Ms Renate Bloem	Antaŭa Prezidanto, CONGO, kaj Re prezentanto ĉe UNO de CIVICUS en Ĝenevo, Svislando	renate.bloem@gmail.com
Mr Marc Bron	Asocio de instruistoj de la savoja lingvo (AES) "le francoprovençal de Savoie", Francio	marc.bron@wanadoo.fr
Ms Flor Rayen Calfunao	Comunidad Mapuche, Ĝenevo, Svislando	calfunaopailalef@yahoo.fr
Ms Valeria Cardi	Observejo ELF, Fakoj de traduko kaj interpreto (ETI), Universitato de Ĝenevo, Svislando	valeria.cardi@eti.unige.ch
Mr Loris Ceschin	Svislando	
Mr Ranieri Clerici	Vic-Prezidanto, Universala Esperanto Asocio Italujo	ranieri.clerici@tin.it
Ms Charmian Common	Re prezentanto UEA/UN, Vic-Prezidanto, Asocio Esperanto-Genève-Régions, Francio www.esperanto-geneve-regions.info	charmian@aliceadsl.fr
Mr Didier Cornuet	Membro, Asocio Esperanto-Genève-Régions, antaŭa dungito de CERN, Svislando	didier.cornuet@bluewin.ch
Mr Renato Corsetti	Itala Esperanto-Federacio (IEF), Italujo	renato.corsetti@esperanto.org
Ms Jayne Cruickshank	Interpretisto	
Mr Probal Dasgupta	Prezidanto, Universala Esperanto Asocio, Barato	probal53@yahoo.com
Ms Jeanne de Boccard	Internacia Konsilio de Virinoj ICW-CIF, Svislando http://www.icw-cif.org/	fmdb@bluewin.ch
Mr Dominique de Mestral	Svisa Esperanto Societo, Svislando	de.demestral@bluewin.ch
Ms Elizabeth de Mestral	Svisa Esperanto Societo, Svislando	de.demestral@bluewin.ch
Mr Istvan Ertl	Interpretisto, Hungario / Luksemburgo	
Mr Ricardo Espinosa	Estro, Interrilata Oficejo por NRO-oj, ODG/UNOG	respinosa@unog.ch
Ms Irene Forzoni	Universitato de Zuriko pri Aplikitaj Sciencoj (ZHAW), Svislando	ireneluna@hotmail.it
Mr Josep Franquesa Sole	Kataluna Esperanto Asocio, Sabadell, Hispanujo	jfranquesasole@yahoo.es
Ms Montserrat Franquesa Godia	Komitato de Tradukistoj PEN, Kataluna Esperanto Asocio, Sabadell, Hispanujo	mfrangul@xtec.cat
Mr Claude Gacond	CDELI, La Chaux-de-Fonds, Svislando	gacond@bluewin.ch
Ms Radhia Gasmi	Interpretisto	
Mr Walter Peter Gaxer	Akademio de antropologiaj sciencoj, ASA Svislando	walter.gaxer@asa-asa.com
Mr Michele Gazzola	Asistanto, Fakoj de traduko kaj interpreto (ETI), Universitato de Ĝenevo, Svislando/Italujo	michele.gazzola@eti.unige.ch
Mr Marco Giardina	IEEE, Svislando	marco.giardina@ieee.org
Mr François Grin	Profesoro, Fakoj de traduko kaj interpreto (ETI), Université de Genève, Svislando	françois.grin@eti.unige.ch

Ms Mireille Grosjean	Kunprezidanto, Svisa Esperanto Societo, Svislando	mireille.grosjean@rpn.ch
Ms Cristina Nicoleta Hulea	Universitato de Neuchâtel, Svislando	nicoleta.hulea@unine.ch
Mr Cyrille Hurstel	Interpretisto, Francio	
Mr Istvan Stefano Keller	Svisa Esperanto Societo, Svislando / Universala Esperanto Asocio (UEA)	stefano.keller@linguistic- rights.org
Mr Kliment Kelmendi	Internacia Ligo por Rajtoj kaj Liberigo de Homoj (LIDLIP), Svislando	kliment@geneva-web.net
Mr Euheno Kovtonjuk	Ukraina Esperanto Asocio — UkrEA, Ukraino	espero111@ukr.net
Ms Myrna Lachenal-Merritt	Monda Federacio por Mensa Sano, Svislando	mymnalachenal@gmail.com
Ms Blandine Legardeur	Interpretisto	
Mr Jorge Antonio Leoni de Leon	Fako de traduko kaj interpreto (ETI), Universitato de Ĝenevo, Svislando / Kosta Riko	tiberido@yahoo.com
Mr François Lo Jacomo	Internacia Ligo de Instruistoj de Esperanto (ILEI) / UEA, Francio	francois@lojacomo.eu
Mr John Mateo Lopez	Svislando / Kolombio	
Ms Lara Magagnini	Universitato de Pizo, Italujo	lara@maragnini.eu
Ms Mélanie Maradan	Fako de traduko kaj interpreto (ETI), Universitato de Ĝenevo, Svislando	maradam5@eti.unige.ch
Ms Nicole Margot	Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL), Redaktoro, <i>Etnismo</i>	n.margot@bluewin.ch
Ms Veronika Martin-Celder	Interpretisto	
Ms Martine Moine	Membro, Asocio Espéranto-Genève-Regions kaj UEA, Svislando	martinemoine@bluewin.ch
Ms Monika Molnar	Lernejo de la Granda Urso, Svislando	esperanto_momix@yahoo.it
Mr Brian Moon	Akademio de Esperanto, Luksemburgo	brian.moon@ename.lu
Ms Claude Nourmont	UEA, Luksemburgo, Redaktoro, <i>Le Monde de l'Espéranto</i>	moonmont@pt.lu
Mr François Randin	Laŭzana Esperanto Societo (LES), Svislando	dannir@citycable.ch
Mr Francesco Cesco Reale	Neuchâtela Esperanto Societo, Svislando / Italujo	cescoreale@gmail.com
Ms Dominique Rentsch	Interpretisto	
Ms Regina Reuschle	Interpretisto	
Ms Tove Skutnabb-Kangas	Profesoro, Universitato de Roskilde, Finnlando / Danlando	skutnabbkangas@gmail.com
Mr Adrian Tanner	Fako de traduko kaj interpreto (ETI), Universitato de Ĝenevo, Svislando	tannera5@eti.unige.ch
Ms Renée Triolle	Reprezentanto de UEA ĉe UNESCO, Francujo	triolle.renée@wanadoo.fr
Ms Caroline Vallve Cheng	Interpretisto	
Mr Mario Velucchi	Komputila Sciencisto, Universitato de Pizo, Italujo	mvalg@velucchi.it
Ms Alessandra Vitale	Svislando	
Mr Jean-Marie Vodoz	Fondaĵo Defendo de la franca, Svislando	jmvodoz@bluewin.ch
Mr Dietrich M. Weidmann	Kunprezidanto, Svisa Esperanto Societo (SES), Zuriko, Svislando	didi@esperanto.ch
Ms Nelida Weidmann	Svisa Esperanto Societo (SES), Zuriko, Svislando	nelida@esperanto.ch

